

Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT
septembro- oktobro 2009, n° 9 - 10 (1251- 1252)

Prezo € 5

SENNACIULO

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo! --- Lanti


Kongres-temo 2009 : Migri senlandlime, vivi sennaciece



SAT KONGRESO – DANKON ARCI ESPERANTO



Eldona Fako Kooperativa



160 paĝoj.
Formato 18x12 cm.
Eldonita en julio 2009.
Prezo : 10€

La eldona fako kooperativa celas faciligi la plenumon de la statutaj taskoj de SAT per eldono de kleriga materialo, pretigita kadre de kolektiva laboro kaj kun laŭeble kohera eldon-politiko, ankaŭ kolektive difinita.

Eldona Fako Kooperativa. 67, Av Gambetta - FR-75020 Paris

Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso

Tiu kompendio de 1878 liveras al ni la esencon de la analizo farita de Karlo Markso en la Unua Libro de La Kapitalo, pri la kapitalismo - "en kiu ne la produktorimedoj estas je la servo de la laboristo, sed ja la laboristo je la servo de la produktorimedoj".

Destinita al popola publiko, skribita en stilo senbalastigita de la scienca aparato kiu igas foje malfacila la originalan verkon, tiu resumo estis aprobata de Markso mem.

La aŭtoro, Carlo Cafiero, itala liberecana komunisto, ne estis disĉiplo de la germana teoriisto, kiun li kontraŭis dum la skismo de la Unua Internacio en 1872.

La antaŭparolo de James Guillaume memorigas al ni la iradon de Carlo Cafiero kaj la tendencojn, kiuj alfrontiĝis tiam sine de la laborista movado.

Kiel aneksaĵo legeblas la korespondado inter Cafiero kaj Markso.



ENHAVO

- P. 4 - Ni agu, ni ĉiam agu
- P. 5 - Pacdeklaro de Nagasako
- P. 7 - Sintenoj de kvin partioj pri la konstitucio
- P. 10 - Tri principoj pri "sen nukleaj armiloj"
- P. 12 - Propono de Konflikto- Komisiono al la P.K.
- P. 13 - Demokrata edukado aŭ libera edukado
- P. 15 - Regi la semojn estas regi la popolojn
- P. 17 - Interna diskuto pri uzado de GMS
- P. 20 - La vualo
- P. 23 - Komparo inter socialdemokrataj partioj en Eŭropo
- P. 24 - La pledo por Ferrer aŭ la defendo de la propeka kapro
- P. 26 - Ĉu revolucio?
- P. 28 - Neda
- P. 29 - Anekdoto por plimalaltigo de la labor-moralo
- P. 30 - Pluezek'
- P. 31 - Mirege 2009
- P. 32 - Bouresse - Canto General
- P. 33 - Pentatoniko
- P. 34 - Blanka poŝtuko
- P. 35 - Ni enterigas vorton de l' vortaro
- P. 35 - Al Gejofobiuloj
- P. 36 - Unuafoje kongresano
- P. 37 Artikolo pri Arcikulo
- P. 37 - La tri moskiteroj
- P. 38 - Liberecana Frakcio
- P. 39 - Sennacieca Frakcio
- P. 41 - Resumo pri la Kongresaj Laborkunsidoj

Desegnoj nigraj - blankaj : Lino Markov
 Desegnoj koloraj : Serge Sire
 Fotoj pri SAT-Kongreso : Anĉjo Pachorano
 Fronto-paĝo: Quiado

DONACOJ

HAMMEBERG - Svedio	19 €
ANONIME - Francio	125 €
BRAAK a. ter Nederlando	48 €
ULANOWSKI Pollando	0,41 €
KOSSATROWSKI - Pollando	0,41 €
PEYROUTY - Francio	5 €
SABATIER Tereza - Francio	70 €

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org.>; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

Plenum-Komitato de SAT :

Prezidanto : Jakvo Ŝram

Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo

Kasistino : Thérèse Sabatier

Membroj: Guy Cavalier, Stefano Herve Gérard Lieblang, Franjo Leveque-Provost, Arturo Prent.

Redakta Komitato - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Frederic Scibor, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Cindy McKee, Gary Mickle, Viola Murasaki, Grazina Opulskiene, Cyril Orsingher, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Franciska Toubale, Jakvo Schram.

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..

Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 15-a de junio 2009.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimensuel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

Kamarado forlasis nin

Ĉi-printempe mortis Willy Alois Ehlers (matrikulnumero 34355), loĝinta ĉe Spießweg 38, 13437 Berlin, Germanio.

Niajn kondolecojn iras al la geparencoj

NI AGU, NI ĈIAM AGU!



La Pacista Frakcio daŭrigas du agadojn.

Unua agado: La batalo kontraŭ la kontraŭpersonaj minoj.

Ekde pluraj jaroj, la Kongreso de SAT sendas al la Ambasadoroj de Ĉinio, Finnlando, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio kaj Usono, leteron



por peti, ke tiuj landoj subskribu kaj ratifu la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas la uzon, la fabrikadon kaj la komercon de kontraŭpersonaj minoj. Ĉiam, la letero estas esperante skribita, kaj la duoblaĵo de ĉi tiu estas skribita laŭ la parolata lingvo en la lando, kiu organizas nian kongreson.

Ĉi tiun jaron, la Kongreso decidis daŭrigi tiun agon (Vd. la unuan paragrafon de la Deklaracio).

En Eŭropa Unio, Pollando subskribis sed ne ratifis la Konvencion, kaj Finnlando nek subskribis nek ratifis ĝin.

Finna SAT-ano diris al ni, ke la finna registaro, kaj ankaŭ la plimulto de la finna popolo ne estas favoraj pri tia subskribo, ĉar Finnlando kaj Rusio havas proksimume 1 313 kilometrojn da komuna landlimo.

Dua agado: la batalo kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj.

La Gvidrezolucio de la Kongreso en Kazanlako proponis ke la kamaradoj de SAT intervenu por ke ilia registaro subskribu la Konvencion de Oslo, kiu malpermesos la uzon, la fabrikadon kaj la komercon de iuj pafaĵojetoj el bomboj.



Fine de aŭgusto, 98 ŝtatoj subskribis la Konvencion, kaj nur 17 ŝtatoj subskribis kaj ratifis ĝin (1).

Do, necesas daŭrigi la batalon por ke la ŝtatoj subskribu ĝin, kaj por ke la subskribintaj ŝtatoj ratifu ĝin.

La ratifo gravas, ĉar:

– laŭ la 17-a artikolo de la Konvencio, ĉi tiu validiĝos por la ŝtatoj, kiuj subskribis kaj ratifis ĝin, nur la unuan tagon de la sesa monato post la trideka ratifo. Por la subskribintaj ŝtatoj, kiuj ratifos ĝin post la trideka ratifo, la Konvencio validiĝos la unuan tagon de la sesa monato post la ratifo de tiu ŝtato.

Plie,

– laŭ la 3-a artikolo de la Konvencio, la ŝtato, kiu subskribis kaj ratifis ĝin, devontigas sin detruigi ĉiujn pafaĵojetojn el bomboj malpermesitajn en la Konvencio plej malfrue 8 jarojn kaj 5 monatojn post la dato de sia ratifo de la Konvencio.

Do, laŭ la plej bona hipotezo: se 30 ŝtatoj ratifus la Konvencion antaŭ la 1-a de januaro 2010, la Konvencio validiĝos nur la 1-an de junio 2010 kaj la 30 unuaj subskribintaj kaj ratifintaj ŝtatoj havus limtempon de 8 jaroj por detruigi siajn stokojn de malpermesitaj pafaĵojetoj el bomboj, t.e. ĝis la 1-a de junio 2018.

Ekde februaro, ĉiun monaton ni skribis, nome de la Pacista Frakcio de SAT, al la franca Prezi-